

Johann Wolfgang von Goethe,  
Feliĉa navigado

*tradukita de Richard Schulz*

Nebuloj ŝiriĝas.  
Serenas ĉielo.  
Timeman rubandon  
Malnodas Eol'.<sup>3</sup>  
La ventoj klopodas.  
Vigligas ŝipestro.  
Rapide! Rapide!  
La ondo disiĝas.  
La for' proksimiĝas.  
Aperas la land'.

*Traduko de la Germana poemo "Glückliche Fahrt" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26) en 1984.*

*Arg-268-542 (2013-02-26 15:11:56)*

*Tiu ĉi poem-traduko aperis presita en 1984 en la "Vestfaliaj Flugfolioj", kiun eldonis la konata Esperanto-poeto Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), kiam li loĝis en la germana urbo Mindeno (Mindena). La trian kaj kvaran liniojn de la poemtraduko mi, Manfred Retzlaff, provis en 2004-09-09 plibonigi; ĉar Rikardo Ŝulco erare neglektis, ke post la vorto "malnodas" oni devus uzi la akuzativan formon "rubandon". Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*

Johann Wolfgang von Goethe,  
Feliĉa veturo

*tradukita de Wilhelm Barnickel*

Nebul' disŝiriĝas,  
Ĉielo heliĝas.  
La timan ligilon  
Malnodas Eol'.  
Susuras la ventoj,  
Ekagas ŝipistoj.  
Rapidu! Rapidu!  
La ondoj partiĝas,  
La for' proksimiĝas.  
Vidiĝas la land'.<sup>4</sup>

*Traduko de la Germana poemo "Glückliche Fahrt" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de WILHELM BARNICKEL (\*1921-09-02) en 1983.*

*Arg-268-544 (2013-07-20 12:20:36)*

*Tiun ĉi poem-tradukon sendis al mi, Manfred Retzlaff, en 1984 mia fervojista kolego Willi Barnickel (Tiroler Str. 12b, D-60596 Frankfurt am Main, Germanujo). La lastan linion de la poemtraduko mi, Manfred Retzlaff, provis en 2004-09-09 pliĝustigi; ĉar s-ro Barnickel erare neglektis, ke post la vorto "vidas" oni devus uzi la akuzativan formon "landon". Kaj la akuzativa finaĵo "-on" ne estas elizebla (ellasebla).*

---

<sup>3</sup>Rikardo Ŝulco skribis origine:

Eolo malnodas

Timeman ruband'.

(Sed tio estas gramatike malĝusta. Devus teksti "Timeman rubandon". M. Retzlaff)

<sup>4</sup>Sinjoro Barnickel origine skribis:

Jam vidas mi land'.

(Sed tie mankas la akuzativa formo "landon".)